**N I A V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MARTO 2002**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**LICEO SUBVENCIITA**

Unu el la decidoj de la renkontiĝo de la Patronaro de la Fondaĵo Esperanto, kiu okazis la pasintan 24an de januaro en Zaragozo, estis aljuĝi al la MADRIDA ESPERANTO-LICEO la kvanton 300 eŭrojn pro la reeldonado fare de ĉi tiu asocio de la verkaĵo "Nuevo Método de Esperanto" de Fernando de Diego.

**FORPASIS HERNÁNDEZ YZAL**

La 24an de februaro 2002 mortis nia kara samideano kaj amiko Luis María Hernández Yzal, fondinto kaj direktoro de la E-Muzeo de Sant Pau D'Ordal (Barcelona), kaj Honora Membro de UEA

**EŬROPA BULTENO**

Rilate al la propono de konsiliano de la Itala E-federacio pri pontlingvo "neŭtrala kaj ne nacia",
li rivecis jenan respondon de la civitana oficejo" *"la eŭropa Komisiono petis al la komuna Servo "Interpretado-konferencoj" de la institucioj kaj organoj de la Eŭropa Unio (SCIC) ekestigi laborgrupon taskitan ekzameni la projektojn rilatajn al lernado de Esperanto kaj la mezuron en kiu ĝi povas esti utiligata kiel intera lingvo por interpretado"*.
BRUSELA INFORMCENTRO. La ĝenerala celo de Informcentro estos starigi daŭran komunikadcentron, kiu, pere de agado pri kaj por lingva egaleco kaj diverseco ĉe internaciaj kaj naciaj organizoj, politikistoj kaj ĵurnalistoj, plibonigos kaj la publikan bildon de Esperanto kaj lingvan konscion. La Brusela komunikadcentro sekvos kaj analizos lingvopolitikajn decidojn tutmonde, agante laŭeble kun aliaj naciaj kaj internaciaj esperantaj organizoj.
Estas fondata Komisiono pri Brusela Komunikadcentro (KBK), kiu konsistos el reprezentantoj de la jenaj asocioj: EEU (3 reprezentantoj), Institucio Hodler(1), BEF (1), UEA(3), la Ĝenerala Direktoro de UEA pro ofico kaj la Kasisto de EEU pro ofico.
En septembro la sveda eŭroparlamentano Cecilia Malmström faris OFICIALAN DEMANDON al la Komisiono por ekscii kial Eŭropa Unio financis neniun Esperanto-projekton dum Eŭropa Jaro de Lingvoj. En januaro 2000, la angla socialisto Richard Corbett volis scii, ĉu Eŭropa Komisiono esploras la eblecojn de Esperanto por la tradukservoj de Eŭropa Unio kun pli ol 20 oficialaj lingvoj. Laŭ Corbett, Esperanto povus esti solvo ĉar nia internacia lingvo estas neŭtrala, regula kaj rapide lernebla. Ankaŭ tiu demando de Corbett ĝenis Eŭropan Komisionon. Pro tio, brita ano de Eŭropa Komisiono Neil Kinnock flankenŝovis la demandon al nebula "komitato" por tielnomata "pritraktado". Intertempe, Kinnock puŝas alian solvon de la lingva problemo ĉe Eŭropa Komisiono: enkonduki la anglan kiel nura laborlingvo.
SKRIBA DEMANDO E-0075/02 de Maurizio Turco (NI) al la Komisiono (14an de januaro 2002) Temo: Laborgrupo de SCIC (Komuna servo de interpretado kaj konferencoj) pri utiligo de la internacia lingvo nomata Esperanto. La Eŭropa Komisiono, pere de la Vicprezidanto Neil Kinnock, petis al SCIC (Komuna servo de interpretado kaj konferencoj) ke ĝi ekvivigu laborgrupon por esplori la projektojn koncernantajn la lernadon de esperanto kaj taksi la mezuron laŭ kiu ĝi povus esti utiligata kiel pontlingvo por interpretado.

**ARTIKOLO PRI ADA FIGHIERA**

En aparta folio mi inkludas artikolon aperintan en la reta versio de El Popola Ĉinio, speciale interesa por tiuj kiuj amikiĝis kun Ada.

http://www.china.org.cn/world/shi-window/kiu_e_k/05.htm

| | |
|---|---|
| **NIA** | **VOĈO** |
| **MARTO 2002** | |

**ESPERANTA TELEVIDO**

La Sekretario de ERA Giorgio Pagano prezentis pasintjare, al kelkaj partoprenantoj de IJF 2001 en Bolsena (Italio), iniciaton pri la eblecoj elstarigi "E-Tv", t.e. informan programon en televida formo, dissendota per TTT de interreto.

Nun, ankoraŭ en tiu kadro, ERA dissendas alvokon al ĉiuj esperantistoj kiuj intencus kunlabori, precipe tiuj kiuj havas iom da kompetenteco (ankaŭ nur hobian) pri televido, kameraoj, informado aŭ simile. Do, ankaŭ al reĝisoroj, aktoroj, redaktoroj, aŭ, ĉiukaze, al interesitoj. Oni povas sendi mesaĝon al esperantoradikalaasocio@esperantio.org>.

Kelkajn informojn vi povas akiri en TTT-ejo: http://www.esperanto.tv , kie vi povas aŭdi ankaŭ (bedaŭrinde nur en la itala lingvo) parton de la debatojn de tiu renkonto en Bolsena.

**E-RENKONTIĜO**

En Decembro kunvenis la "Coordinadora de Esperanto de la CNT", en kampadejo El Pinajarro de Hervás (Cáceres), dank'al la helpo de la kampingo mem kaj de la "Fundación de Estudios Sociales Extremeños Pío Sopena de Extremadura". Partoprenis 15 membroj de "Coordinadora" kiuj diskutis pri la plibonigo de kontaktoj inter ili kaj plej efika uzado de la organo de CNT.

Resumo pri la evento apreris en la ĵurnalo de CNT, februaro de 2002 )

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

18a-19a majo. Kongreso de la Valencia E-Federacio kaj Murcio. Vall d'Uxo (Castellón).
1a-7a julio. Internacia SAT-kongreso. Alicante.
5a-7a julio. 61-a Hispana Esperanto-Kongreso. Alicante.
11-17 julio. HoRo. Hispana Renkontiĝo (HEJS). Salamanca.
23ª-28ª aŭgusto Eŭrop-unia Kongreso. Verona (Italio) "Efectiva lingva egaleco:rajto de la euxropanoj"
24ª- 31ª aŭgusto. 28-a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo. Séte (Francio)

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Bazaj kursoj:

ESCUELA POPULAR DE PROSPERIDAD. Instruas Toni Cebrián. Luis Cabrera 19. 28002 Madrid. Tel. 91 562 70 19. Merkrede 20,00-21,30 horo

UNIVERSIDAD AUTÓNOMA DE MADRID. Marco Trevisán Lunde kaj merkrede 12-13h. Tel. 915 617 613

Kurso por triaĝuloj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18.

Prelegoj:11ª de marto. 19,00. Lumbildoj komentitaj. Hispana folkloro: karnavalo.

Ada - stelaca semanto en Esperantujo

de Wang Lihua

Mi konatighis kun s-ino Ada Fighiera-Sikorska (1929-1996), redaktoro de "Heroldo de Esperanto" dum la 80-a UK en Tampereo, Finnlando, somere de 1995.

Loghante kun shi en la sama hotelo, mi renkontis shin chiutage dum la tuta kongresa semajno. Shi estis svelta, emis blue kolorigi siajn palpebrojn kaj uzi malhel-rughigilon kaj rozan ungo-vernison. Koliero el perloj pendis sur shia kolo. Shi marshis rapide kaj ankau parolis rapide, tamen entuziasme kaj bonhumore. "Jen talenta virino!" mi pensis en mi, rigardante shin rapide foriranta malproksimen.

Estas mirinde, ke virino tute sola redaktis kaj eldonis gazeton pli ol 30 jarojn. Tio vekis grandan scivolemon en mi kaj s-ino Wang Yuqin, redaktoro de la China Radio Internacia. Ni kaptis shin dum matenmangho kaj interkonsilighis kun shi pri nia intervjuo.

Tiuvespere shi venis en nian chambron. Gustumante konfitajhojn, kiujn ni kunportis el Pekino, shi libere babilis kun ni. Kvankam shi parolis rapide, tamen shia tono estis milda. Mi kaj s-ino Wang bombardis shin per demandoj. Shi ghoje respondis kaj rakontis al ni sian malfelichan infanecon.

Shi naskighis en Sidlce, Pollando, la 26-an de januaro 1929. Malfeliche, milito eksplodis en 1939. Nur 10-jara, shi ja spertis krueiajhojn de la milito. Shia patro Sikorski, generalo, kune kun miloj da aliaj polaj oficiroj estis murdita de malamikoj. Dume shi, shiaj patrino kaj fratino estis eskortitaj al Siberio. Nur en 1942 shia familio sukcese forlasis Sovetion kaj en novembro 1948 revenis al la patrujo.

Ada studis en universitato de Varsovio. Influate de esperantistoj-studentoj, shi eklernis Esperanton en kurso, kiun gvidis s-ro Julio Baghy, fama Esperanta verkisto kaj poeto.

"Mi estas felicha, ke mi havis tiel bonan E-instruiston. Dank' al li, mi faris grandan progreson kaj sukcesis en ekzamenoj elementa kaj mezgrada. Poste mi alighis al E-organizo," diris Ada kun granda ghojo.

Ni auskultis, magnetizitaj de shia rakonto.

En 1958, antau la jubilea UK en Varsovio, shi jam estis vicprezidanto de la Varsovia E-Asocio. En 1959 shi fondis kune kun aliaj la E-redakcion de la pola radio kaj farighis unu el ghiaj unuaj redaktoroj. Tiutempe shi konatighis kun s-ro Gian Carlo Fighiera, konstanta kongresa sekretario de UEA. Por prepari UK en Varsovio li loghis en la kongresa urbo. En la afero por la komuna idealo ili enamighis unu al la alia.

Post la geedzigho en 1960 en Bruselo ili kune prilaboris la verdan ghardenon Esperantujo. En la vivo ili interparolis nur en Esperanto.

En 1962 Ada transprenis de s-ro Teo Jung, fondinto de "Heroldo de Esperanto", ghian redaktan laboron, kiun shi fidele plenumis 34 jarojn. "Tiam mi iom timis, ke mi ne kapablos fari tiun grandan laboron. Sed mia edzo kuraghigis min, promesante helpi min en la komenco." Tiel komencighis shia nova vivo.

"Mi devas konfesi, ke tio ne estas normala laboro por iu ajn redakcio de nacilingva jhurnalo." Ada diris al ni, ke shi devas mem fari chion. Krom redaktado, enpaghigado kaj fotado, shi prizorgis ankau administradon, korespondadon kun legantoj kaj kunlaborantoj... Por plenumi

tiom da taskoj oni devas havi lertecon kaj kapablecon. Tiajn posedis Ada. Kaj poste komputoro multe helpis shin en shia laboro.

"Kial vi ne dungas helpanton?" mi demandis.

"Heroldo funkcias sen profita celo. Do mi ne havas sufiche da mono por la pago," shi respondis kun rideto. "Iam venis al mi volontulo el Koreio. Tamen mi rifuzis lin pro la supre menciita kauzo. Krome, mi ne havas lokon por li. Fakte, mia dormochambro servas al mi ankau kiel kabineto."

"Redaktado de Heroldo estas granda laboro chiutaga. Mi povas diri, ke mi jam adaptis mian vivon privatan al tiu laboro."

Kun tempopaso, shi farighis pli sperta kaj kapabla. Heroldo instruis al shi uzi sian tagon pli bone kaj pli efike. "Ghi donis al mi tiom da ghojo, tiom da plezuro intelekta kaj movada, tiom da instruigho, scioj, konatigho kun la homoj diversaghaj de malsamaj etnoj el diversaj landoj, ke mi fakte sentas min ege felicha, ke mi povas fari tian laboron."

Efektive, Ada sciis ne nur diligente labori, sed ankau bone prizorgi sian propran familian vivon. Okupita de la redaktado, shi faris ankau mastrumadon, flegis sian edzon kaj prenis sur sin la respondecon de achetado kaj preparado de manghajhoj. Shi dormis ne multe. Chiutage shi ellitighis frue. Reveninte de la matena bazaro, shi komencis sian laboron strechan kaj signifoplenan.

Shi shatis marshadi por sin ekzerci. Al shi plachis klasika muziko. Agrablis bela muziko kaj en la chambro kaj en la kuirejo.

Ada estis senlaca semanto en Esperantujo. Shi cheestis multajn internaciajn, naciajn kaj lokajn kongresojn kaj konferencojn. Chie shi prelegis kaj instruis Esperanton. Nemalmultaj el shiaj lernantoj farighis eminentaj esperantistoj. La 80-a UK en Tampereo estis por shi la 35-a. Partopreni UK estis granda ghuo por shi, char dum la kongresa semajno shi povis fari multajn aferojn, renkontighi kun malnovaj amikoj kaj konatighi kun novaj el diversaj kontinentoj. Kaj krome, shi povis iom sufiche dormi.

En 1994 shi farighis Honora Membro de UEA kaj ricevis Fame-premion. Je tio shi diris kun rideto: "Tio estas ekster mia atendo."

"Tion vi meritas!" Naskighis en mi respekto al tiu senlaca kaj elstara esperantistino. Shia vocho estis tiel dolcha kaj agrabla, shia rideto tiel bela kaj sincera.

Kvankam shi forpasis en 1996, tamen shia sindonemo al Esperanto ankorau inspiras al multaj adeptoj de Zamenhof energie labori por la bela idealo de la homaro.

El Popola Ĉinio